

Ivo Lapenna: **Retoriko**, dua, reviziita kaj kompletigita eldono, kun portreto de la aŭtoro kaj kovrildesegno de Reto Rosssetti; 294 p., formato 13,5 × 19,5 cm<sup>2</sup>; prezo: 44 steloj por bindita, 36 steloj por broŝurita ekzemplero. Persona eldono de la aŭtoro.

Al mia recenzo pri la unua eldono en S.R. 3 38 mi aldonu jenon: En ĉi tiu dua eldono, kiu eksteraĵe distingiĝas per pli belaj papero kaj tipografio, precipe la unua parto, kiu temas pri lingvistiko, estas konsiderinde pliampleksigita kaj reviziita. Interalie ĝuste al ĉi tiu parto de la unua eldono d-ro Solzbacher direktis siajn venenajn sagojn. La lingvisto Waringhien en sia interesa kaj simpatia antaŭparolo al ĉi tiu dua eldono dediĉas al ĉi tiu parto specialan paragrafon, kiu garantias ke la aŭtoro ne prezentas al la legantoj ian fuŝan ĉarlatanaĵon. Ĉi tiu parto ampleksis en la unua eldono 52 paĝojn, nun 98 iom pli grandajn paĝojn.

El ĉi tiu parto oni povas ĉerpi bonegan materialon por nacilingvaj broŝuroj pri la Internacia Lingvo eldonotaj okaze de la Zamenhof-jaro; precipe el la jenaj partoj: pp. 59-71; 83-90, 100-110. La aŭtoro lerte frakasas multajn pseŭdosciencajn stultaĵojn, kiujn laikoj kaj lingvistoj kutimis kaj ankoraŭ kutimas elbuŝigi kaj surpaperigi kvazaŭ argumentojn kontraŭ la Lingvo Internacia „Kion oni prave povas postuli de la lingvistoj, se ili vere deziras resti fidelaj al sia propra scienco, estas ne „pledi” aŭ „aprobi” la Internacian Lingvon, — same kiel neniu postulas ke ili „aprobu” kiun ajn lingvon —, sed tute simple koni Esperanton kaj rekoni ĝin kiel socian fakton kun ĉiuj sekvoj de tiu rekono. Kun la escepto de kelkaj honorindaj filologoj, ĝenerale la lingvosciencaj specialistoj ne faras tion.” (p. 67).

En la dua parto ĉefe ŝanĝiĝis kaj kompletigis la ĉapitro pri la historio de la retoriko (p. 121-130), aldoniĝis unu paragrafo sur p. 138 (pri la voĉo), kaj reviziigis ankaŭ la paĝoj pri fonetiko (149 kaj 150). Krome aldoniĝis la inaŭgura parolado de Prof. Edmond Privat en la UK en Haarlem kaj ampleksa indekso (p. 273/290). Cetere en la teksto la aŭtoro faris multajn etajn plibonigojn. Tamen, ne ĉiu ŝanĝo estas plibonigo, ekzemple la ŝanĝo de *eblaĵo* al *ebleco* (p. 47/9). Kun iom da bedaŭro mi konstatis la pentoplanan revenon de la peka formo „*po-minute*” (1-a eldono, p. 84/5) al la fundamenta „*en minuto*” (p. 145/-1). La vorto *linia*, kiun mi kritikis en mia tiama recenzo, nun ŝanĝiĝis al *gesta*. Mi tiam ne kritikis la vorton *noto*, kiu bedaŭrinde restis (sur p. 139/-5; 157/-6) kaj devus esti *tono*. Jen do eta sugesto por la tria eldono, kiun mi tre kore deziras al ĉi tiu bonega verko.

— W. P. R.

G. Waringhien: **Grand Dictionnaire Espéranto-Français**, eldonaĵo de Librairie Centrale Espérantiste, 41, Rue Descartes, Paris Ve; 368 p., 14 × 19,5 cm<sup>2</sup>, tola bindaĵo sub plasta kovrilo; prezo: 2 200 fr. + 10% por afranko (sume 81 steloj).

Profesoro Waringhien kaj d-ro Wüster sendube estas niaj plej eminentaj vortaristoj; ambaŭ okupiĝas ne nur pri Esperanta leksikologio, sed Waringhien ankaŭ pri franca, kaj Wüster pri teknika kaj ties normigado. La laboron de Waringhien konas preskaŭ ĉiuj Esperantistoj sub la formo de Plena Vortaro; tiun de Wüster malmultaj el la Enciklopedia Vortaro Esperanto-Germana, de kiu bedaŭreginde aperis nur la duono. Kaj nun Waringhien feliĉigis la francojn kaj tiujn kiuj bone konas la francan (al kiuj mi ne apartenas) per ĉi tiu ampleksa kaj sendube bonega vortaro, kiu por la ceteraj esperantistoj signifas promeson de estonta, pli plena Plena Vortaro, kiu tiam, kiel ĉi tiu, ankaŭ enhavu geografiajn, etnologiajn kaj proprajn nomojn. Cetere ankaŭ al tiuj kiuj ne bone konas la francan lingvon, ĉi tiu esperanto-franca vortaro povas bone servi ĉe diversaj okazoj.

Estas interese kompari vortarojn unuj kun aliaj, kaj konstati diferencojn en signifoj atribuitaj kaj en formoj preferataj. Ekz. Waringhien kaj Wüster donas tute malsamajn signifojn al „*komao*”. Dum P. V. diras „*komenti = komentarii*”, kaj „*spontana = spontanea*”, 25 jarojn poste la nun recenzata vortaro diras: „*komentarii = komenti*”, kaj „*spontanea = spontana*” kaj krome „*sponta = spontana*”, kaj ne malverŝajne vortaristo post 25 jaroj notos „*spontana = sponta*” kaj „*spontanea = sponta*”. Jen etaj indikoj, por tiuj kiuj ankoraŭ ne scias tion, ke Esperanto vivas kaj grade iomete ŝanĝas sian fizionomion.

La laŭdo kompreneble ne signifas, ke nenio estas kritikinda. En recenzo de la sendube pli kompetenta Roger Bernard mi legis, ke la tradukoj de kelkaj vortoj estas malĝustaj. Mi mem vane serĉis kelkajn vortojn en la vortaro, kiuj laŭ mia opinio devus enesti. Mi dubas ĉu kelkaj novaj formoj estas preferindaj ol samsignifaj malnovaj, ekz. *mikrokoko* (ĉu ĉi tiu nomo ne signifas la genron *Micrococcus*?) kaj *kokko* (Waringhien) por *kokaco* kaj *kokuso* (Wüster), *kolimati* (Waringhien) kaj *kolimi*, la formo kiun mi uzis en 1940 en la enkonduko de la *Fotometria Atlaso de la Sunospektro* de Minnaert, Mulders kaj Houtgast; cetere, tiuj jam uzitaj formoj mankas ĉe Waringhien.

La vorton *produkto* li tradukas nur per *produit*, ne per *production*; la vorto *produktaĵo* mankas; ankaŭ tio ne estas konforma al ĝisnuna lingvuzo.

Nepre ne konforma al la fakta lingvuzo estas la paragrafo pri *po*, kiu estas pure fundamenta, kiel ankaŭ tiu en P.V. 2a ĝis 4a eldonoj, dum

en P.V. 1a eldono la ekzemploj pli bone respegulis la faktan lingvuzon. Ja multaj uzas, tute konscie — kiel mi mem —, aŭ ne pri tio konsciante, la vorton *po* en ne-fundamenta senco kaj eble eĉ rifuzas uzi ĝin en la fundamenta senco. Mi havas la impreson, ke ni bezonas ankoraŭ kelkajn prepoziciojn. Ja ĉi tiu kontraŭfundamenta uzo de *po* naskiĝis el akre sentata manko de prepozicio (france *par* aŭ kelkfoje *pour*); kaj la saman konstaton ni povas fari pri „*far*”. Kaj certe ĉi tiu ne estas la lasta prepozicio kiu al ni mankis.

La aŭtoro menciis multajn pure beletrajn neologismojn, por ke la leganto ne vane serĉu en sia vortaro la vortojn kiujn li renkontas en sia legaĵo. Se tiel, li nepre devas menci i sufiĉe ĝeneraliĝintan lingvuzon kiu ne povas esti rigardata kiel eraro de esperantistoj lingve iom mal-lertaj, sed estas intenca kaj konscia.

Mi konstatis ke ja estas menciita *imagi al si*, lingvuzo miaopinie nepre kritikinda, ĉar tiu *al si* signifas nenion ne jam esprimitan en la verbo *imagi* mem; oni ja ne povas *imagi ion al iu alia!*

Kompreneble la ekzemploj kiujn ĉi-supre mi menciis, estas iom hazardaj; mi ja ne trastudis la tutan libron. Ĉi tiuj etaj kritikoj montras ankoraŭ unu fojon ke homa laboro perfektu ne povas, sed neniel malpliigas la laŭindecon de la verko de nia tre meritplena samideano *Waringhien*.

Restas nur menci i, ke la papero kaj la tipografio, kaj la tuta ekster-ajo de la libro estas indaj al la enhavo. La prezo povas ŝajni sufiĉe alta, sed ĉi tiu verko nepre valoras sian prezon. — W. P. R.

{4 + 7 + 8} (05) = 089.2

**Belarto**, Aldono al la Revuo „*Esperanto*”, 72 paĝoj kaj kovrilo, formato 21 × 26 cm<sup>2</sup>, prezo por individuaj membroj de UEA 11 steloj, por aliaj 13 steloj.

Ĉar en la Revuo „*Esperanto*” de UEA, malgraŭ kresko de ĝia amplekso, restis malpli kaj malpli da spaco por beletraĵoj kaj similaj, oni decidis eldoni kiel suplementon, specialan belartan kajeron. Ĉi tiu unua kajero, redaktita de *William Auld*, enhavas prozaĵojn kaj poemojn, originalajn kaj tradukitajn, kaj inter la aŭtoroj kaj tradukintoj troviĝas multaj famuloj. La temaro estas bunta. Dekses ilustraĵoj ornamas la kajeron, el kiuj kvar apartenas al artikolo pri la islanda pentristo *Kjarval*; el tiuj kvar unu estas kolora reproduktaĵo. Eĉ kanton sespaĝan kun muziko de *F. Merrick* kaj teksto de *Marjorie Boulton* ĉi tiu kajero donas.

En dekdu-kaj-duonpaĝa polemika artikolo *Prof. Lapenna*, sub titolo „*Kelkaj Lingvistikaj Demandoj*” lerte kaj sprite polemikas kontraŭ la malicaĵoj de d-ro *W. Solzbacher* en *Amerika Esperantisto*. Sed kiom helpas tio, se ĉi tiu kajero ne trafos en la manojn de la vikti-

moj de la *Solzbacher*-a informado? La individuaj membroj de UEA jam estis sufiĉe informitaj pri ĉi tiu kalumnio, kaj ne malmultaj samideanoj opinias ke ni prefere ne lavu nian malpuran tolaĵon publike.

*Edwin de Kock* verkis interesan artikolon pri *La Miraklo de la Esperanto-poezio*, kiu miraklo konsistas parte en tio, ke niaj poetoj ne estas denaskaj esperantistoj, sed lernis la lingvon, kiam ili jam estis plenaĝaj, aŭ almenaŭ jam viriĝantaj. La aŭtoro konscias ke ĉi tiu miraklo estas nur tre nesufiĉe prilumigata far li, kaj certe ĉi tie troviĝas bela temo por juna studento de nia literaturo.

*G. F. Mackink*, bone konata al la legantoj de S.R., diskutas en artikolo titolita „*Ludadi sur vulkano*” la unuan kajeron de „*The International Language Review*”, kies celo estas science studi interlingvistikon, ne: enkonduki unu solan interlingvon en la mondon; ĝi haltas antaŭ la sociologia faceto de la problemo, tio estas: antaŭ la ĉefa faceto de la problemo. Dualoke, diras *Mackink*, la internacilingva problemo estas psikologia, kaj nur trialoke lingvistika problemo. La diskutata kajero enhavas unu anglalingvan artikolon de nia samideano *Turner*, kiu diris ke ja la tempo mankas por daŭrigi la eternan diskutadon: „Se ni malsukcesas fini Babelon nun, kiam Unesko donis al ni la verdan signalon, ni havas bonan ŝancon ke la nova milito faros ĉiun internacian lingvon superflua.”

Resume: ĉi tiu unua kajero de *Belarto* estas varme rekomendata al vi.

—W. P. R.

830-3.03 = 089.2

*Joseph von Eichendorff*: **El la vivo de netaŭgulo**, tradukita de *Paul Bennemann*. Eldonita de *Limburger Vereinsdruckerei GmbH*, *Limburg/L*, Germanio. 12 x 19 cm<sup>2</sup>, 140 p., 4,80 gmk., bindita.

La libro estas plaĉa, same laŭ la aspekto, kiel laŭ la enhavo. *Bennemann* liveris tradukon en bona Esperanto kaj li penis, kiel li diris en siaj lingvaj rimarkoj, konservi la romantikan spiriton. En la fino de la libro li ankaŭ dediĉas paĝon al la romantiko kaj paĝon al la aŭtoro. Tiel la leganto estas iom informita kaj povas loki la verkaĵon en la tempon kaj ĉirkaŭaĵon kaj inter la aliajn verkojn de la sama aŭtoro. Do pri la atingiĝo de la tradukinto kaj eldonisto nur laŭdon.

La lego de la libro naskis ĉe mi demandon, kiu tuŝas la tutan temon de traduko kaj eldono de libroj en Esperanto. Ĉar mi dubas ĉu ĉe la nuna juna kaj mezaĝa generacio ekzistas interesiĝo pri tiaj verkaĵoj, kia la koncerna. La maniero per kiu *Eichendorff* karakterizas siajn personojn kaj mediojn estas multe superita far la modernaj aŭtoroj. La intrigoj ŝajnas nun al ni artefaritaj se ne artifikumitaj. La tuto impresas malreale kaj malsincere. Oni ne povas riproĉi tion al la aŭtoro: li estis ido de sia tempo. Ĉu la riproĉo trafas *Bennemann*, ĉar li elektis la